

INTERNACIA LERNEJA



ESPERANTO - REVUO

**Lerni en
Esperanto**



Majo 1986
n-ro 2 (38)
13a Jaro



JUNA AMIKO, revuo por lernejoj kaj komen-
cantoj. Aperas trifoje jare. Redaktoro O. Knichal,
Budaörs, Patkó u. 3., Hungario. Grafika aranĝo S.
MacGill. Abonoj: en la soc. landoj ĉe resp. landaj
asocioj aŭ koncernaj kompetentaj instancoj, en
aliaj landoj ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015
BJ Rotterdam, Nederlando. Prezo 5,70 gld.

Nemzetközi
esperantó
diáklap

Megjelenik
évente háromszor

XIII évfolyam
86/2 szám

Felelős szerk.:
Princz Oszkár

Kiadja
a Magyar
Esperantó
Szövetség
Budapest
Kenyérmező u. 6.
1081

Felelős kiadó:
Vaskó Tibor

Készült a
MESZ
Sokszorosítóban
hearota 86-0017

Kiad. eng. sz.:
III/IFJ/30/1976.

ISSN
0230-1318

*

TASKO
DE ĈIU
ESPERANTISTO:
PROPAGANDI
LA REVUON
INTER LA
KOMENCANTOJ!

Pluraj niaj legantoj skribis al ni
lastatempe pri la enhavo de nia revuo,
plejparte kun kontento. Se paroli pri
iliaj kritikaj rimarkigoj, oni ŝatus vidi
pli da kantoj kaj legaĵoj por la plej
junaj esperantistoj.

Alia demando estas, ĉu la legantoj
mem deziras kontribui al tiu ĉi dezir-
inda plenumo. En nia poŝto jam aperis
pluraj kontribuoj por la esperantist-
etoj, sed ankoraŭ eĉ ne unu kanto,
kiun spontane sendus niaj legantoj. Pli
ĝojiga situacio estas pri la poemoj.
Tamen ilia sortimento estas sufiĉe
senvaria, se ni konsideras la fakton,
ke la infanoj vivas en la tuta mondo.
Ni bonvenigas kvalitatajn tradukojn de
naciilingvaj porinfanaj poemoj, sed
ankaŭ altnivelajn originalaĵojn.

Krome, sed nepre ne lastvice, ni
esperas ricevi kontribuojn ankaŭ
rekte de niaj junaj legantoj, kiuj
parolus — ankaŭ per bildoj — ĉefe pri
iliaj okupoj, Esperanto-agado kaj simile.
Skribu baldaŭ!

La kovrilo: Unu el la domoj de Kultura Centro
Esperantista en Svislando (vidu p.4). Nova kovrila
grafiko: András Kucsera.

FABELO

Fonto ek'kuris en
river'et-lern'ejon,
sibla¹j ŝton'etoj
tiklis² la piedojn.

Verdan kampon³ venis
jam akvo rivera
kun dika talio⁴,
haŭto verda.

Ĝi migris⁶ tra l'mondo,
iĝis hom-gent'ano⁷:
parlament'ano⁸
barb'ul⁹-oceano.¹⁰

El la hungara tradukis B. Vaha

1) sibli — el'igi "ssss", 2) tuŝ'eti ies haŭton, 3) larĝa ter-peco sen arb'aro, 4) parto proksimume meze de la homa korpo, 5) kio kovras la korpon, 6) longe iri de loko al loko sen-cele, 7) ano de la hom'aro, 8) kiu el parlamento kun-decidas pri la aferoj de lando, 9) homo kun longa har'aro sur la vizaĝo, 10) pli granda ol maro.

Lerni Esperanton ...

kaj lerni en Esperanto

Nia mov'ado bezonas lern'ejojn, kiuj instruas Esperanton per bonaj modernaj metodoj kaj centrojn, kie oni povas studi aliajn aferojn per la internacia lingvo, ek'koni la Esperantajn kulturon kaj literaturon kaj studi aliajn naciajn kulturojn kaj lingvojn.

Unu el la lokoj aŭ centroj, kiuj laboras por tiuj ĉi celoj, estas *Kultura Centro Esperantista (KCE)* en la urbo La Chaux-de-Fonds. Ĝi trov'iĝas en la franc-lingva parto de Svislando. Oni devas veturi dum preskaŭ unu horo per vagon'aro aŭ aŭtomobilo por al-veni al tiu ĉi urbo el Bienne/Biel aŭ Neuchâtel. La aŭtobuŝa stacio apud la Centro nom'iĝas "Lernejo Esperanto".

KCE havas sep grandajn mal-novajn domojn, unu apud la alia, sur la flanko de monto. Oni re-star'igas kaj bel'igas la domojn. Du belaj klas-ĉambroj, manĝ-salono, du kuirejoj, ofic'ejo kun libro-servo kaj kelkaj dorm-ĉambroj jam estas pretaj. La centron vizitis jam personoj el multaj landoj — eĉ el Irano, Japanio kaj Ĉinio.

Unu-foje monate okazas studaj semajn-finoj pri Esperanto, somere pli ofte. Dum la tuta jaro, sed ĉefe somere, okazas unu-semajnaj kursoj pri literaturo, scienco, pedagogio kaj aliaj temoj. Oni povas resti en KCE ankaŭ sen parto-preni kurson — la apuda naturo estas tre bela kaj somere kaj vintre. En la urba biblioteko trov'iĝas tre granda kolekto de libroj kaj gazetoj pri Esperanto kaj lingvaj problemoj; ĝi estas unu el la plej grandaj kolektoj de tiu speco en la mondo.

Jun'uloj povas sufiĉe mal-multe-koste rest'adi en KCE kaj ĉe-esti kurson kontraŭ parto-preno en labor-grupo por re-bon'igi la domojn. Sed unue necesas skribi al KCE por inter-konsenti pri tio kaj ricevi pli'ajn informojn: KCE, B.P. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

* * *

Kompreneble, KCE ne estas unu-sola centro de la Esperanta kulturo. El tiuj aliaj ni memor'igas almenaŭ pri *Internacia Esperanto-Muzeo en Wien* kaj *Biblioteko Butler* en Britio. La muzeo, kiu fariĝis en la jaro 1929 parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko, havas preskaŭ 18 000 volumojn, krome diversajn dokumentojn, muzik'aĵojn, filmojn, lum-bildojn, fotojn, bild-kaj poŝt-kartojn, glu-markojn kaj multajn aliajn aĵojn. Ĝi estas al-ir'ebla lunde, merkrede kaj vendrede inter la 9a kaj la 16a horo. En tri salon'egoj estas daŭraj ekspozicioj.

Biblioteko Butler trov'iĝas en la sid'ejo de Esperanto-Asocio de Britio. Montagu Butler (elp. montagju batle) star'igis ĝin en 1922. Ĝi en-havas ĉirkaŭ 11 000 librojn, 1000 volumojn de gazetoj, 10 000 poŝt-kartojn, glu-markojn kaj fotojn.




Foto: Stefan MacGill

S-ro Claude Gacond instruas per koloraj bildoj en unu el la modernaj klas-ĉambroj de KCE.

Esperanto gajnis super la angla

Ek'de septembro 1984 tridek sep ge-knaboj de la VII-a D-klaso en la 8-a Unu'eca politeknika mez-lernejo en Sofio dev'ige lernas Esperanton kaj la anglan lingvon po 3 horoj semajne. Pri tiu ĉi eksperimenta instru'ado rakontis post unua lerno-jaro la lern'eja direktor'ino S. Peltekova:

"Por la Esperanto-klaso ni elektis nur bon'egajn klas'anojn. Ili lernas la Inter-nacian Lingvon laŭ la programo, kiun oni bone preparis. Ni liber'igas ilin laŭeble de al-donaj ekster-lern'ejaj taskoj, ĉar kompare kun la aliaj ili lernas unu plian lingvon! Mi opinias, ke la lern'ado de Esperanto pli-riĉ'igas iliajn konojn. La unua paŝo: jam en januaro 1985 ili komencis korespondi kun sam-ag'uloj el GDR, USSR, Hungario, Japanio, Italio, ĝustrio, Britio kaj el aliaj landoj. Kaj jen, agrabla fakto: la junaj esperant'istoj lernis Esperanton nur tri monatojn kaj jam povis sukcese util'igi sian lingvo-scion. Sed post du jaroj de lern'ado de la angla lingvo ili ne povas libere korespondi kun ge-jun'uloj, kiĉs lingvo estas la angla. Komence ne ĉiuj emis lerni Esperanton, sed poste ili bone ek-komprenis, kian gajnon tio signifas. Ali-flanke, dek jun'uloj venis en tiun klason speciale por lerni Esperanton."

La junaj esperant'istoj sukcese parto-prenis la 18-an nacian festivalon de Esperanto-parolo kaj kanto en Ĥaskovo kaj ilia kant-grupo gajnis la unuan premion. Somere ili starigis kontaktojn kun ali-land'anoj en la Inter-nacia Esperanto-Kurs'ejo en Pisanica. Iuj el ili parto-prenis ankaŭ la lastan Inter-nacian E-labor-brigadon en Pleven.

KRAJONO KAJ PAPERIO RESTAS...

Pos-kalkul'iloj en lern'ejoj

Ĉu poŝ-kalkuliloj helpas aŭ mal-helpas instru'adon de matematiko? Ĉu oni en-tute uzu ilin en fundamenta lern'ejo? Oni komencis uzi poŝ-kalkul'ilojn en la sveda gimnazio (la 10-a, 11-a, 12-a aŭ 13-a klasoj de la sveda lern'eja sistemo) meze de la sep-dekaj jaroj. La ge-knaboj simple mem kun-prenis siajn poŝ-kalkulil'ojn kaj ekuzis ilin anstataŭ simpla kalkul'ilo.

Iuj instru'istoj timis, ke en-konduko de tiuj aparatoj kaŭzos, ke la kompreno de mal-facilaj kalkuloj mal-pli-grand'iĝos. Tamen ek'de la stud-jaro 1977/78 oni permesis poŝ-kalkul'ilojn en la gimnazio. Hodiaŭ oni uzas ilin ankaŭ en la 4a-9a klasoj de la fundamenta lern'ejo.

Inter-tempe oni eksperimentis kaj post komparo de spertoj oni inter-alie resumis, ke regula uz'ado de kalkul'iloj en la matematika eduk'ado ne devas kaŭzi mal-pli grandan kapablon de per-kapa kalkul'ado, kiel oni pensis. Oni ankaŭ rimarkis, ke iuj ge-knaboj preferas uzi krajonon, kvankam ili rajtas util'igi kalkul-maŝinon. Ankaŭ la instruistoj ek'ŝatis la eksperimenton kaj ili opiniis, ke la kalkul'iloj donas pli grandajn ebl'ecojn ol tradicia eduk'ado. La ge-knaboj, kiuj pro iu kaŭzo perdis sian labor'emon, povas ek'havi novan sin-tenon al lern'ēja laboro, almenaŭ al matematiko, kaj elekti taskojn, kiuj rilatas ilin (ekzemple, kiu havas intereson pri motoroj, havu la okazon kalkuli pri motoraj aferoj). Sen poŝ-kalkul'ilo tiuj ge-knaboj ofte havas tiajn mal-facil'aĵojn kun la kalkul'ado, ke ili neniel povas solvi interesan problemon.

La celo de ĉio estas, ke la ge-knaboj ricevu pli grandan kompren'adon de matematiko kaj ne ke ili okup'iĝu pri detal'aĵoj en program-lingvoj. Montr'iĝis, ke poŝ-kalkul'iloj sub-tenas kaj pli-grand'igas la intereson de lern'ej'anoj pri matematiko. Tamen, oni de-komence devas lerni kalkul'adon per tradiciaj iloj: kraiono, papero kaj la propra kapo.

(Laŭ Kontakto)



Nia konkurso

okaze de la jubileo de Esperanto

Kiel ni jam anoncis, nia revuo kaj Hungara Esperanto-Asocio sub la aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio proklamis inter-nacian literaturan kaj artan konkurson por ge-jun'uloj inter 6 kaj 18 jaroj. Oni povas konkursi laŭ jenaj kategorioj:

A. Originala poemo (ĝis 30 linioj), la temo laŭ-plaĉa, la teksto estu sur la formato A4 kaj en tri ekzempleroj.

1. Kategorio 11—14-jaroj
la ĝis 3a premioj en valoro
de 600, 400 kaj 200 forintoj.

2. Kategorio 15—18-jaroj
la ĝis 3a premioj en valoro
de 600, 400 kaj 200 forintoj.

B. Originala rakonto (novelo), la minimuma amplekso estu du paĝoj (60 linioj), la temo laŭ-plaĉa, la ceteraj kondiĉoj kaj premioj same kiel ĉe punkto A.

C. Desegnaĵo, bonvenas precipe kolora, sur bon-kvalita papero, dors-flanke kun la titolo de la verko, formato minimume A4, la temo laŭ-plaĉa.

1. Kategorio 6—10-jaroj,
tri premioj en valoro
de 600, 400, 200 forintoj.

2. Kategorio 11—15-jaroj,
tri premioj en valoro
de 600, 400, 200 forintoj.

Ĉ. Fotograf'aĵo, laŭ-eble rilatu la vivon de la infanoj aŭ ge-jun'uloj, formato minimume 13 x 18cm, kun dors-flanke la titolo aŭ alia konvena teksto.

Unu kategorio 15—18-jara, tri premioj de 600, 400 kaj 200 forintoj.

Ĉiu konkurs'anto rajtas partopreni maksimume per tri ĝis nun ne publik'igitaj verkoj.

La konkurs'aĵojn oni sendu plej malfrue ĝis la fino de aŭgusto 1986 al Hungara Esperanto-Asocio, H-1368 Budapeŝto,

Kenyérmező u. 6, Hungario. Sur la koverto estu slogano
KONKURSO.

Ĉiu konkurs'ajo portu kompletan nomon, naskiĝ-daton kaj adreson de la aŭtoro. Sen tio la verkon oni ne prijuĝos.

Ĉiuj, kiuj gajnos premiojn, ricevos ankaŭ diplomojn. La plej sukcesa jun'ul(in)o krome gajnos sen-pagan rest'adon en somera tend'aro en Hungario.

Fabelo el Estonio

Bovo kaj abelo



Venis foje bovo al la rivero en tre varma tago por trinki. Apud la rivero sur herbo li vidis abelon¹, kiu ankaŭ venis por trinki la akvon.

La bovo ek-koleris, ke tia mal-granda best'eto kuraĝas veni al la loko, kie trinkas li, la bovo. Li demandis:

— Kiel vi kuraĝas veni al mi proksimen — ĉu vi pensas, ke vi estas iu granda besto?

La abelo respondis:

— Oni devas esti kontenta je tio, kio oni estas — iu estas granda kaj forta, la alia estas mal-granda kaj havas multe da saĝo!

Je tio la bovo eĉ pli kolere kaj bru'egis:

— Kion parolas tia eta est'ajo pri saĝo! Mi vin pied-premos per mia unu-sola pied'ego en la teron!

La bovo jam levis la pied'egon por mort'igi la abelon, sed tiu ĉi ek'flugis rekte en la orelo de la bovo. Tie ĝi ek'bru'etis. La bovo rapid'ege kuris tra herb'ejoj kaj arb'ar'etoj, tiel ke lia haŭto² fariĝis tute mal-seka. Fine li falis laca sur la herbon.

Nun la abelo el-iris el lia orelo kaj diris:

— Neniam plu moku la mal-grandan kaj ne laŭdu vian saĝon, nek ridu pri la naturo!

Trad. J. Palu

1) besto, kiu produktas mielon, 2) kio kovras la korpon.

Bona vento? malbona vento?

Generale oni pensas, ke la vento al-portas kune kun si bonan kaj mal-bonan veteron kaj ke tio rilatas al la mov'igo de aero super la tero. Oni demandas ofte: kien perd'iĝas la vento, kiam regas sen-venta stato.

Kio estas vento? Por simple diri, ĝi estas horizontala¹ mov'igo de aero, al kiu sin ligas vertikalaj² fluoj de aero. Se la amasoj da aero ek'mov'iĝas, tiam ek'estas vento. Ĉiun flu'adon de aero kaŭzas varmo.


Se ni demandas pri la eco de iu vento, ni devas ek'scii, kiun direkton kaj kian rapid'econ ĝi havas. La orienta vento al-portas vintre mal-varman³, somere varman aeron. Kontraŭe, la okcidentaj ventoj blovas³ super oceanoj. La maraj akvo-amasoj trans-donas al la vento sian varmon, tial vintre la okcidenta vento al-portas varman veteron. Somere la vento super oceano mal-varm'iĝas kaj al-portas mal-varman kaj pluvan veteron. Kompletaj⁴ sen-venta stato okazas tre mal-ofte.

Relative sen-venta stato estas ĉirkaŭ la ekvatoro⁵. Pli mal-proksime blovas daŭraj ventoj — pasatoj. Super la polusoj⁶ staras mal-varma polusa aero. Kiam tiu ĉi mov'iĝas al la pli sudaj aŭ pli nordaj lokoj, ek'estas orienta polusa vento.

Kaj nun ion pri musonoj. Kiel spir'ado estas regula flu'ado de la aero, somere direkte de la maro al kontinento⁷, vintre en la kontraŭa direkto. Musonoj blovas en orienta Azio Aŭstralio, io okcidenta kaj orienta Afriko. Somere estas en tiuj ĉi reginoj iom pli varme ol super Hinda oceano, ĉar la vento blovas direkte la la nord-okcidento. Vintre la aero super oceano estas pli varma, ĉar sur la kontinento regas forta mal-varmo. Do, la musono blovas direkte al la maro. Nun ni jam ne devas miri, kial tiel regule la vento blovas

dum-tage de la maro al la kontinento kaj nokte en la mal-sama direkto. La kialo estas fakte la sama kiel ĉe la musonoj.

En la libroj pri Saharo ni povas ofte legi pri samumo. Eĉ dum bel'ega vetero tiu ĉi seka kaj varma vento scipovas mal-agrable surprizi⁸ la homojn kaj bestojn kaj dum mal-longa tempo ankaŭ mort'igi ilin. Same danĝera estas harmatano en okcidenta Afriko. En Siberio ni konas buranon kaj purgaon, kiuj similas al blizardo. Blizardoj bl'ov'egas en formo de mal-varm'egaj tempestoj⁹ super eben'aĵoj¹⁰ de Norda Ameriko.



1) Unu-direkta, sen lev'igi aŭ mal-lev'igi, 2) de-supre mal-supren aŭ male, 3) mov'igi per certa rapid'eco, 4) plena, tuta, 5) linio sur mapo, kiu duon'igas la ter-globon je norda kaj suda partoj, 6) la plej norda kaj la plej suda punktoj de la Tero, 7) larĝa ter-peco; mond-parto, 8) kaŭzi ion, kion oni ne atendas, 9) fort'ega vento, 10) sen el-star'aĵoj aŭ profund'aĵoj.



Okaze de la cent-jar'igo de la inter-nacia lingvo Esperanto, anoj de la pola familio Worsztynowicz star'igis familian Esperanto-klubon. Ĝis la jubilea jaro de Esperanto en 1987 la klubo volas atingi la nombron de 100 famili'anoj, kiuj bone parolus Esperanton.

La patro de la tuta familio estas muel'isto¹ Tomaso Orstyn (Worsztyn), kiu en 1746 ek'loĝis en la urbo Gostyń (ĉirkaŭ 80 km sude de Poznań). En la 19-a jar-cento oni ofte mal-bone skribis la nomon de tiu ĉi familio, pro tio nun-tempe diversaj partoj de la familio nom'igas jene: Worsztynowicz (vorŝtinoviĉ), Bursztynowicz (burŝtinoviĉ), Orsztynowicz (orŝtinoviĉ), Osztynowicz (oŝtinoviĉ). Ĉiuj kun tiuj ĉi nomoj estas idoj de la muel'isto Tomaso, kiu venis en Pol'landon ver'ŝajne el okcidenta Eŭropo. Se la homoj kun similaj nomoj loĝas ankaŭ en via ĉirkaŭ-aĵo, kontakt'igu ilin kun la familio en Pollando.

Ĉiu-jare multaj anoj de tiu ĉi familio parto-prenas la Familian Feri'adon "Esperanto hejme" en Miedzygórze (en 1983 — 25 personoj, en 1984 — 40 personoj) kaj jam pli ol 50 famili'anoj sci-povas aŭ lernas Esperanton. Nun-tempe vivas ĉirkaŭ 4000 poste-uloj de Tomaso Orstyn. Ili loĝas ĉefe en Pol-lando, sed ankaŭ en aliaj landoj (Aŭstralio, Britio, Francio, Federacia Respubliko Germanio, Germana DR, Kanado, Usono k.a.). Tiuj, kies antaŭ-uloj for-iris el Pol-lando ĉirkaŭ la jaro 1900, plej-parto ne sci-povas la polan lingvon.

Ĉu ie en la mondo ekzistas similaj familioj, kiuj ankaŭ deziras star'igi familiajn Esperanto-klubojn? La familio Worsztynowicz kun ĝojo renkont'igos kun ili en Miedzygórze. La adreso: Familio Worsztynowicz, P.O. Kesto 311, PL-50-950 Wrocław 2, Pollando.

1) mueli — dis-er'igi ion, ekzemple per maŝino.

Solve de la antaŭa kruc-enigmo: La homoj venas kaj for-iras, sed la lingvaj baroj restas.

Beleco iras ai ni longe — kiel lumo de steloj.

Jean Cocteau

La plej granda mal-helpo de nia sci'ado estas tio, kion ni scias,
ne tio, kion ni ne scias.

Cl. Bernard

Se la homo jam antaŭe atendas mal-sukceson, ĝi certe venos.

E. Hemmingway

Neniu estas tro mal-juna por lerni.

Uwe Saeger

Al kiu ne sufiĉas mal-multe, al tiu sufiĉas nenio.

Epikuroso

La plej granda feliĉo en la vivo — cert'eco, ke la ali'uloj ŝatas
vin.

V. Hugo

SAGAJ VORTOJ

Nia epoko tute ne estas pli bona ol ni.

H. de Balzac

Kiu nenion scias, tiu devas ĉion kredi.

Jan Neruda

Ek'koni la propran ne-sci'adon estas la plej bona parto de nia
sci'ado.

Se la homo iras sur mal-ĝusta vojo, ju pli kapabla kaj rapida li
estas, des pli rapide li mal-proksim'iĝas de la vero.

F. Bacon

Ni ne vivas laŭ nia volo, sed laŭ nia sci-povo.

Menandros

Ju pli multe vi parolas, des mal-pli la homoj memor-tenos el via parolado.

Fenelon

Pli bone estas brul'igi eĉ nur unu kandelon ol mal-beni mal-lumon.

Konfuceo

Ĉu vi scias...

* ke en 1985 estis en la tuta Ĉinio pli ol 200 milionoj da bicikloj? En 1983 en Pekino okazis 8 462 trafikaj akcidentoj¹, inter ili 3 172 kaŭzis bicikloj; mortis en-tute 439 homoj kaj 184 el ili kaŭze de bicikloj;

* ke la plej moderna fer-voj-trafiko estas en Japanio? Post kelkaj jaroj oni volas en-konduki vagon'arojn, kiuj veturos kun rapid'eco de 600 kilometroj en unu horo;

* ke ŝak-ludo est'iĝis en la sesa jar-cento de nia jar-kalkulo en Hindujo? Ĝin el-trovis Sessa, ofic'isto de la reĝo (ŝako) Ŝehran, kies tasko estis zorgi pri la amuz'iĝo de la reĝa familio;

* ke iuj bestoj el-tenas sen manĝ'aĵo vivi longan tempon? Ekzemple testudo² unu jaron, albatro³ 35 tagojn... Ali-flanke iuj etaj birdoj ĉesas vivi sen manĝ'aĵo jam post ses horoj;

* ke la homo laboris sub la tero jam antaŭ 33 mil jaroj? Tion pruvas restaĵoj de ligna karbo⁴, kiujn oni trovis en Egiptio. Tamen, en departemento⁵ Veszprém en Hungario ekzistas min'ejo⁶, en kiu oni el'uzis karbon jam antaŭ 120-180 mil jaroj;

* ke la plej profunda punkto sur nia tero estas en la Pacifika oceano? En 1951 oni mezuris tie profund'econ de 10 863 metroj, sed antaŭ-nelonge jam 10 924 metrojn. Ver-ŝajne pro tio, ke diversaj metodoj de mezur'ado ne estas same precizaj kaj krome la tero en tiu ĉi regiono daŭre mov'iĝas, do la profundo povas esti ĉiam mal-sama.

1) kun-puŝiĝo de vetur'ilo kun homo aŭ kun alia vetur'ilo, 2) kvar-pieda besto kun tre mal-mola kovraĵo de korpo, 3) mara birdo, 4) plej ofta brul'aĵo, 5) land-parto, 6) kie oni akiras karbon k.a. el la tero.

KANTU!

NI KANTU! - klisé

Tra la arboj... (Hoor de wind waait...)

Nederlanda popola
trad. s-ino Isbrücker

Tra la ar-boj blo-vas ven-to, Tra la mu-roj blovas ĝi. Ĉu la sankta ho-mo ve-nos? Aŭ la
Hoor de wind waait door de bo-men, Hier in huis zelfs waait de wind. Ĉu de Sinti wel ho-men Nu hij?

ven-ton timos li? Aŭ la ven-ton ti-mos li? Jes, li vo-nos en mal-lu-mo, Certe li - ne restos
weer zo le-lijk vindt, Nu hij? weer zo le-lijk vindt? Ja, hij komt in donk're nach-ten, op zijn paard - je, o zo

for Cer-te li ne res-tos hejme, Ĉar li a-mas nin en kor' Ĉar li a-mas nin en kor'.
snel. Als hij wist hoe wij op hem wach-ten, Je, ge-wis dan kwam hij wel, Ja, ge-wis dan kwam hij wel.

Ki-u fra-pas ti-e, Ki-u fra-pas ti-e, Ki-u fra-pas ti-e al la dom'? Cer-te
Ki-u grumblas of-te, Kaj mal-ve-ron di-ris, Ha-vo-s cer-te grandan pu-non, fi! Do a-
Hoor, wie klopt daar kin-d'ven, Hoor, wie tiki daar zachtjes le-gen't raam? 'Is een
Stou-te kin-d'ven, zegt moe, Krij-gen knar-ren, zegt moe, Of een zak-je, zegt moe, met wat zoul. Want je

fremda ho-mo, ki-u voj-e - ra-ris, Di-ru, ki-o es-tas li-a nom'?
 ten-tu bo-ne kaj o - be-u ĝi-am, Ti-am re-kom-pencon ha-ves vi.
 aremd'ing ze-ker, Die ver- doeld is ze-ker, Ĝi- gnaoens mgen naar zji naam.
 weet wel, zegt moe, Dat Sint Niklaas, zegt moe, Van die stou-te kind-ren heel nie: houdt.

Ho, Sankta Ni - ko-
 Sint Ni - co - laas, Sint

la - o, vi - zi - tun in en la ves-per, Kaj en la ŝu-on me - tu fran - da - jon ei su - ker.
 Ni - co - laas, Breng ons van a - vond een bezoek, En strooi dan wat lek - kers, In een of an - d'ie hoek.

Nederlanda popola
 Trad.s-ino Isbrücker

Luno brilas... (Zie de maan schijnt...)

Lu - no bri - las tra la ar - boj, Ĉe - su bru - i in - fa - nar', Fest - ves -
 Zie de maan schijnt door de bo - men, Mak - kers staakt uw wild ge -
 raas? 't Heertijk

pe - ro ko - men ci - ĝis, La plej be - la de la jar'. Plen - a ten - de ba - tas
 a - vondj' is ge - ko - men, 't A - vonj' - je van Sin - ter - klaas. Vol ver - wach - ting klopt ons

ker'. Ve - nos ĝo - jo aŭ do - lor'. Plin - a - ten - de ba - tas kor', Ve - nos ĝo - jo aŭ do - lor'.
 hart, Wie de koek krijgt wie de gard. Vol ver - wach - ting klopi ons hart, Wie de koek krijgt wie de gard.



El la insuloj¹, de la mar-bordo kaj sen-arb'ara interno de norda Aŭstralio venis junaj indiĝenoj², kiuj sin prepar'adis por far'iĝi instruistoj ĉe Kormilda³ Kolegio en Darwin kaj al-portis tien legendojn de siaj triboj³. Jen unu el ili, kiel pri-laboris ĝin por ni sinjor'ino Winsome Greenhalgh.

La soifa sablo-rano

"Kvavak, kvavak, kvak, kvak" diris soifa⁴ sablo⁵-rano⁶.

Antaŭ tre longe, kiam ĉstis varme, rano
 El-trinkis kaj el-ĉerpis⁷ lagojn kaj riverojn.
 Ĝi grand'eg'iĝis, sed mal-antaŭ⁸ ĝi are
 Koléris multaj bestoj. Fine aglo⁹ trovis
 Ĝin dum ripozo ĉe la supro de la monto.
 Tien kondukis li tre kolerajn bestojn,
 Kiuj kri'egis kune. Tamen, eĉ sen honto
 Dormis la nun grand'ega sablo-rano.

"Kvavak, kvavak, kvak, kvak" ne diris la dorm'ema⁹ rano.


Tiam la grandaj bestoj ĵetis akrajn lancojn.
 Ĉiuj kun-kriis je lerta kangurua trafo.
 De-nove akvo fluis, longe mal-proksimen
 El la grand'ega korpo de la sablo-rano,
 Al kiu iris multaj fiŝoj, multaj bestoj.
 Sed mal-feliĉa sablo-rano, tro mal-sana por
 Eĉ movi sin du tagojn, plena de protestoj¹⁰
 Kuŝis sur varma sablo apud bilabongo.¹¹

"Kvavak, kvavak, kvak, kvak" lamentis la mal-bona rano.

1) ter-peco meze de akvo, 2) kiu nask'iĝis kaj vivas en la sama loko, lando, 3) aro da homoj, kiuj vivas kune sur unu loko, 4) kiu tre bezonas trinki, 5) ĝi trov'iĝas precipe tie, kie mankas akvo, 6) kvar-pieda akvo-besto, 7) ĉion el-preni, 8) granda kaj forta birdo, 9) longaj batal'iloj, 10) diri ion kontraŭ, 11) lag'eto, kiu restis en antaŭ river'ujo, post kiam la rivero ŝanĝis sian direkton, 12) plore plendi.

SE VI ATENTE LEGIS LA JUNAN AMIKON...

vi povos pli facile solvi ĉi tiun kruc-enigmon, ĉar la kaŝfrazo estas trov'ebla en pli antaŭa numero de *Juna amiko* kaj en linioj H1.V14.H69.



Horizontale

1. Unua parto de la kaŝ-frazo
11. Piede paŝi (R)
12. Greka litero (reen)
13. Vir-nomo
15. Romia numero

16. Universala Kongreso
17. ...remo, fama itala urbo
19. Porke "parolis"
20. Mal-granda
21. Vid-organo
23. Mar-birdo mikse (R)
24. Gigant', kolos'


26. Lirika poemo
27. En ĉiu tempo
29. Monat'
31. Long-kola long-beka marĉa birdo (R)
32. Akvo-ferm'ilo
34. Artikolo
36. Flav-ruĝan
39. Alia greka litero (3,14)
40. Mikse tip'
42. Danĝeran man-geston
44. Kanapo, divano (R)
45. Reen: strian sovaĝ-beston
46. Ornam'aĵo (oro, arĝento)
47. Kore ŝati, reen
48. Vers-fin'aĵ'
50. Ne min kaj ne vin
51. Liter-signo de boks-venko
52. Laboro per long-tenila ilo
56. Itala rivero
57. Duone sata
58. Tro mon-ŝpara
59. Mezo de lego
61. Pur'igi per lango
62. Mikse ĵet'
63. Sud-eŭrop'an'
65. Sen-kolora vizaĝo
66. Mikse revoj
68. Urbo en GDR mikse
69. Tria parto de la kaŝ-frazo

Vertikale

1. Signo de amo
2. Proksim-orienta lando
3. Litero prononce
4. Fikiza mezur-unuo
5. Fali: akvo el nulo
6. Reen: Trans'igos

7. Skrib'aĵoj unu sub la alia
8. Literoj de hungara E-revuo.
9. Kiuj ne kapablas paroli
10. Sekvas sepan
14. Dua parto de la kaŝ-frazo.
18. Sen-roba
20. Mal-grandan
22. Teleskop'aĵ'
25. Supozi, fantazii (R)
27. Bon-gusta frukt'
28. Ŝvel'aĵ'eto sur la haŭto
30. Parto de hospitalo
33. El-uzitan tekst'aĵon
35. Plej mal-granda ero de materio
37. Mezo de suno (!)
38. ...ida, akra-gusta kiel citrono
39. Mult-braka mara besto (R)
41. Prefikso
42. Kapra "parolo"
43. Densa ĉiela akvo-vaporo
44. Sid'ilo sur la dorso de ĉevalo
48. Interna flanko de vesto fariĝas ekstera (R)
49. Batilo de najlo
52. Dezerta sovaĝa hundo
53. Komenco de vagon'aro (!)
54. Jes ruse
55. Reen: tag-part'
57. Somera Esp. Lernejo en Eger
60. Bon-humore
61. Reen: granda ĉambro (R)
64. L.N.M.
66. Persona pronomo
67. Senvokala Jes

J. Fórizs



El 21 bildoj apartenas ĉiam du, unuj al la alia. Kiu restos sola?

La distribuejo de la Hungara Poŝto informis nin, ke ekde nun JA estos aĉetebla en Budapeŝto nur en la subaj — pli grandaj — gazetvendejoj. Do, Budapeŝtaj esperantistoj estas petataj serĉi nian revuon nur en la gazetvendejoj ĉe la subaj adresoj (ĉiuj en Budapeŝto):

Adreso	Telefono
V. Váci út 10.	185-604
V. Szabadsajtó u. 6.	184-840
SUGÁR Üzletközpont Örs vezér tér	843-160/69
Magyar Jakobinusok tere Déli pu.	—
Szt. István krt 25.	314-334
I. Bem u. 9.	352-346
V. Felszabadulás tér 4. (Párizsi udvar)	181-401
József nádor tér 1.	185-850
CORVIN Áruház	335-551
Lenin krt. 17.	423-929
Hegedüs Gyula u. 43.	491-505
Baross u. 59.	131-286
SKÁLA Áruház	852-222/28
Petőfi Sándor u. 17.	189-013
Rákosfalva park 3/c (XV.)	847-274
Hírlapbolt (KHI)	•
V. Bajcsy-Zs. u. 76.	116-269

AL NIAJ LEGANTOJ



Grupo de komencantoj (18-28-j.) komune kaj aparte, tut-monde pri vojaĝ'ado, turismo, muziko, popol-arto, Esperanto-ag'ado, inter-ŝanĝas pm, pk, Esperant'ajojn. Komununa adreso: Esperanto-klubo ERO, u. Ĉernenko 1, a/ja 41, SU-662320, Soveta Unio. * Catherine Kasemaa, 14-jara lernantino, SU-203170 Haapsalu, Noukogude 8-21, Estonio. * Magdalena Wielkiewicz, 17-jara lice'an'ino, ul. Wojska Polskiego 227, PL-97-300 Piotrków Trybunalski, Pollando. Ŝatas historion, literaturon, poezion, interesajn librojn pri bestoj, kolektas bild-kartojn, belajn kovertojn, kasedojn, gazetojn pri modo. * Dorota Pakosz, 17-jara, ul. Dworcowa 49, PL-47-217 Raszowa k/Koźła, woj. Opolskie, Pollando. Pri jun'ul'ara muziko, kolektas ĉion interesan. Krom Esperanto lernas la anglan kaj rusan lingvojn.

Labor-brigado ĉe Nigra maro

Bulgara Esperanto-Junul'aro organizas de la 1-a ĝis la 23-a de aŭgusto 1986 Inter-nacian Esperanto-Labor-brigadon en la vilaĝo Sâdievo proksime de Burgas. Oni akceptas grup'etojn kun estroj, kaj petas sci'igi la nomojn de ties anoj ĝis la 1-a de majo 1986. *Necesas la konsento de la landa jun'ul'ara sekcio!*

Oni laboros sep horojn tage ĉe rikolto de fruktoj kaj legomoj. Post-tag-meze oni devas parto-preni lingvan kurson. Vespere estos amuza programo, okazos vizitoj al historiaj lokoj kaj ripoz'ejoj ĉe Nigra maro, kompren'eble kun ebl'eco sun-ban'iĝi.

NIA POŝTO



Kiel en ĉiuj revuoj ankaŭ en la *Juna Amiko* estis kaj estas diversaj rubrikoj. Por ĉiuj legantoj, des pli por la junaj, estus utile, se oni enkondukus sportan rubrikon. Reformebla estas laŭ mia opinio la rubriko "Ni kantu", kie oni povus publikigi ĉiujn muzik-materialojn.

S. Storoĵev, Voroneĵ



Eble vi povus doni al mi iujn konsilojn aŭ rekomendojn pri kolektado de Esperanta literaturo por infanoj; eble vi havas iun superfluan bibliografion ktp. Nin interesus ankaŭ verkoj pri alproprigo de Esperanto-kulturo al infanoj. Ankaŭ sperto de divers-landaj familiaj tendaroj.

I. Gonĉarova

Rim. de la redakcio: Espereble niaj legantoj kaj kompetentuloj en tiu ĉi kampo povos doni al vi utilajn konsilojn kaj helpon.

humuro



— Sinjoro, doktoro, antaŭ du monatoj vi diris al mi, ke mi gardu min antaŭ ĉio kio estas mal-seka.

— ???

— Mi ŝatus demandi, ĉu mi jam rajtas lavi min.

* * *

— Har'aro de ge-patroj griz'iĝas tiam, kiam la infanoj estas mal-obe'emaj.

— Tio signifas, patr'ino, ke vi estis tre mal-bona, ĉar la har'aro de la av'ino estas tute griza.